Aliĝilo por 62 IJK 2006

Persona nomo _____
Familia nomo _____
Naskiĝdato _____ Lando _____
_
Adreso _____
UEA-kodo _____ Telefono _____
Mi deziras ricevi informojn retpoŝte ☐ Retadreso
Ino ☐ Malino ☐ Vegetarano ☐ Ĉiomanĝanto ☐
Memzorganto ☐

partoprentempo (se ne tuto) _____
mi sendos la antaŭpagon _____
mi ŝatus loĝi en: junulargastejo, sur lito ☐ junulargestejo, sur lita matraco ☐
mi ŝatus loĝi kun _____
mi kontribuas al la programo per _____
mi bezonas invitleteron ☐ (limdato por peti invitleteron estas la 1-a de majo 2006)

Se vi bezonas vizon – plenigu! Pasporta numero _____

Pasporto valida ekde _____ Pasporto valida ĝis _____

Labor- / Stud – loko (kun adreso kaj telefono) _____

_____

Mi sendas la fotokopion de la pasport-paĝo kun foto ☐

Kondiĉoj!
La kotizoj enhavas nenian asekuron kaj ne inkluzivas ekskursojn. Via aliĝo ekvalidas, kiam la LKK ricevas la antaŭpagon kaj plenigitan aliĝilon. La aliĝperiodo estas kalkulata laŭ la sendodato de la kotizo. Por kalkuli la kotizon validas via aĝo la 31-an de julio 2006. Se vi bezonas invitleteron, vi devas krompagi 10 eŭrojn. La kotizo estas transdonebla al alia persono sed neredonebla. Se vi havas problemon pri antaŭpago, vi devas informi nin pri tio per la retadreso ijk@tejo.org

Mi konsentas kun la prezentitaj kondiĉoj kaj aliĝas al la 62-a IJK 2006
Subskribo:_____

Antaŭpagon sendu al UEA-konto: ijkb-b (kun indiko IJK 2006)

Adresoj:
poŝta adreso de LLK :
62. IJK – Esperanto
p.p. 452
ba – 71000 sarajevo
Bosnio-Hercegovino

ĝenerala retadreso de LKK: ijk@tejo.org

Por specifaj celoj bonvolu uzi jenajn retadresojn:
aliĝilo – ijk.alighilo@tejo.org
programkontribuantoj – ijk.programo@tejo.org
invitleteroj por havi vizon – ijk.vizoj@tejo.org

http://www.tejo.org/ijk

62-a IJK

Multkultureco kaj Tutmondiĝo

SARAJEVO

BOSNIO-HERCEGOVINO

06.08.-13.08. 2006.

Bonvenon la duan fojon al Sarajevo

Post 33 jaroj Sarajevo denove organizas IJK-n.

Kial Sarajevo?

Sarajevo estas urbo kie kuniĝas la oriento kaj la okcidento, urbo kiu troviĝas en la mezo de sudorienta Eŭropo. Ne ofte okazas ke IJK gastas en ĉefurbo. Tio signifas ke dum la IJK ne estos enue. Dum jarcentoj Sarajevo estis simbolo de multkultureco kaj toleremo. Je distanco de nur cent metroj troviĝas preĝejoj de kvar religioj de la mondo. La kultura vivo dum la somera periodo en Sarajevo estas tre vigla. Preskaŭ ĉiun someran tagon en la urbo okazas diversaj kulturaj eventoj, festivaloj, ekspozicioj ktp.

Multkultureco kaj tutmondiĝo

La kongresa ĉeftemo ŝajne ne povus trovi pli trafan medion por ĝia pritraktado. Kio okazas pri kultura bunteco en la tutmondiĝa procezo? Ĉu la kultura diverseco estas kondamnita al pereo kaj unuformiĝo? Ĉu la multkultura Sarajevo jam spertis tutmondiĝajn tendencojn jam dum ĝia lasta tragika historio?

Kial la tramuleto?

Sarajevo estis la unua urbo en meza Eŭropo kiu havis tramon. Ĝi estis enkondukita la saman jaron kiam Zamenhof verkis la unuan libron. Ekde 1992 Sarajevo estis sieĝata dum kvar jaroj. Dum tiu ĉi tragika epoko, kiu kaptis atenton de la tuta mondo, la urbo estis grave difektita. Kiam la tramo refunkciis en la urbo, la urbanoj sentis ke la liberiĝo baldaŭ venos kvankam la sieĝo daŭris ankoraŭ du jarojn.

Manĝado

Manĝoj estas tre bongustaj, malmultekostaj kaj ĉietroveblaj.

Ekskursoj

Sarajevo havas tre belan ĉirkaŭaĵon. La kongreso okazas nur dek kilometrojn de la olimpikaj montaroj, ses kilometrojn de fonto de la rivero Bosna kaj cent dudek kilometrojn de la urbo Mostar – la celo de la kongresa ekskurso – kaj ĉio ĉi promesas bonajn naturajn kaj kulturajn travivaĵojn.

Kiel atingi?

Ĉar Sarajevo estas ĉefurbo de BkH, ĝi estas facile atingebla ...piede, ĉevale, bicikle☺. la Flughaveno, busstacidomoj kaj la trajnstacidomo estas proksime de la kongresejo.

Loĝejo

La loĝejo estas komforta, ĉambroj estas du aŭ tri litaj kun duŝo kaj necesejo. La manĝejo,la kongresejo kaj la loĝejo estas en la sama konstruaĵo.

Kotiztabelo (en €)

Aĝo	A-landanoj	B-landanoj	C-landanoj
<20	**25**	**20**	**10**
20-27	**35**	**30**	**15**
27+	**65**	**55**	**35**
Antaŭpago	**20**	**20**	**10**

Landkategorioj:

A: EU-landoj (sen la novaliĝintaj kaj Grekio), Japanio, Kanado, Monako, Norvegio, San-Marino, Svislando, Vatikano, Usono, Aŭstralio, Nov-Zelando, Israelo.

B: Andoro, Ĉeĥio, Estonio, Grekio, Hungario, Kroatio, Malto, Latvio, Litovio, Pollando, Slovakio, Slovenio.

C: ĉiuj aliaj landoj.

Rabato: se vi aliĝos antaŭ la 3-a de januaro 2006, vi ricevos rabaton de 10 eŭroj.

Malrabato: se vi aliĝos post la 30-a de aprilo 2006 aŭ surloke, vi pagos 10 eŭrojn pli ol en la tabelo.

Surloka malrabato: se vi ne estas membro (aŭ patrono) de TEJO aŭ UEA, krom la kategorio MG, vi krompagas 30 eŭrojn.

Loĝkostoj por semajno (en €):

- lito en junulargastejo (2–3-personaj ĉambroj) 80 eŭroj-
matraco en junulargastejo 40 eŭroj

Manĝado por semajno (en €)				
Manĝo	Maten-, tag-, vesper-manĝoj	Nur maten-manĝoj	Nur tag-manĝoj	Nur vesper-manĝoj
Prezo	**52** □	**15** □	**25** □	**20** □